NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
esperantobi@gmail.com
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 20 ∈. Speciala: 15 ∈. Familia: 35 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

MARTO/APRILO 2009 **Nro. 78 (2/09)**

ASAMBLEA GENERAL ANUAL

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 29 de mayo**, a las 19,30 h., en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º Dcha., con el siguiente

Orden del día:

1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior.

2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos correspondiente al año 2008.

3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2009.

4. Informaciones varias por parte de la junta directiva.

5. Nombramiento de nueva junta directiva.

6. Ruegos y preguntas.

Dada la escasa asistencia habida en la anterior asamblea general, hacemos un llamamiento a todos los socios para que acudan a la de este año y, de esa manera, contribuyan al mantenimiento del Grupo.

LOKE ...

FORPASIS DÁMASO MIELGO.



La 30-an de marto forpasis en Santurco (Bizkajo) nia kara samideano Dámaso Mielgo Ostolozaga. Li estis 92-jara. Veterana esperantisto, li estis unu el la lernantoj de Juan Muro, kiu instruis Esperanton al kelkaj blinduloj en la ejo de O.N.C.E. (Nacia Organizaĵo de Hispanaj Blinduloj). Tio okazis dum la 40-aj jaroj de la pasinta jarcento, kiam la Grupo de Bilbao ne estis ankoraŭ laŭleĝe agnoskita.

Danke al Juan Muro kaj al homoj kiel Dámaso, Esperanto ne mortis en Bilbao post la hispana intercivitana milito kaj la esperantistoj postvivantaj tiun kruelaĵon trovis malfermitajn pordojn por kuniĝi en tiu ejo de O.N.C.E. Tiel, la historio de la E-Grupo de Bilbao en tiuj jaroj estis forte ligita al aro de blinduloj.

Dum la lastaj jaroj, sanproblemoj ne permesis al Dámaso ĉeesti la kunvenojn en nia grupejo, sed neniam perdiĝis tiu fadeno, kiu ligis lin al ni.

Dámaso, ripozu pace. Ni ne forgesos vin.

CUOTAS DEL AÑO 2009.

En breves fechas, procederemos al cobro de las cuotas del año 2009 a aquellos socios que las tienen domiciliadas a través de un banco o caja de ahorros. A los demás, os recordamos que, cuanto antes hagáis el pago, el primer beneficiado será nuestro Grupo. Las cuotas vigentes, iguales que las del año 2008, son:

Cuota normal:	20,00 euros anuales.
Cuota reducida:	15,00 euros anuales.
Cuota familiar:	35,00 euros anuales.

E-kurso.

Daŭrigas la kurso, kiu gvidas nia samgrupano **Teodoro Ibáñez** ĉe la Ruĝa Kruco de Bilbao. Gelernantoj montris grandan intereson kaj kelkaj el ili jam demandis pri la eblo fariĝi anoj de nia asocio.

NE FORGESU (KAJ UZU !) LA RET-ADRESON DE NIA E-GRUPO :

esperantobi@gmail.com

Ni regule rigardas ĝian enhavon. Tamen, se ni ne tuj respondus, ne maltrankviliĝu : ni ne estas profesiuloj, kiuj daŭre deĵoras antaŭ komputilo. Sed certe ni respondos kiel eble plej baldaŭ.

VENONTAJ KONGRESOJ.

- 28-a de majo ĝis 3-a de junio. **68-a Eŭropa Esperanto-Kongreso**. Herzberg am Harz (Germanio).

- 2-a ĝis 5-a de julio. **68a Hispana Kongreso** de Esperanto kaj 14a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Malago. www.esperanto.es

- 10a ĝis 18a de julio, samtempe kun Somera Esperanto Studado (SES), en Slovakujo okazos jam la **dua renkontiĝo de lernu!-uzantoj**, kreantoj kaj helpantoj. Kiel kutime, matene okazos diversnivelaj Esperanto-kursoj, posttagmeze - uzinoj, konkursoj, prelegoj kaj vespere - distra programo. Eblos ankaŭ pasi internaciajn ekzamenojn de Esperanto. Post la aranĝo ĉiuj estas invitataj kune veturi al Internacia Junulara Kongreso, kiu okazos en Ĉeĥujo tuj post SES.
  http://lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/index.php


- 18-25 julio **65-a Internacia Junulara Kongreso, IJK** en Liberec, Ĉehio, kun la temo "Libereco". Por aliĝilo, programo kaj aktulalaj novaĵoj vizitu la retpaĝon: ijk.esperanto.cz. Kontaktoj per retpoŝto: ijk@esperanto.cz

- 18-25 julio **82-a Kongreso de SAT** - en Milano, Italio. Titolo de la Kongreso estas: "Elmigri senlandlime, vivi sennaciece". Inf.: Andrea Montagner, andrea.montagner@arciesperanto.it

- 25-a julio ĝis 1-a aŭgusto. **94-a Universala Kongreso** de Esperanto. Bialystok (Pollando). http://94uk.bialystok.pl

- 5 - 11. oktobro **17-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo** en bela mediteranea urbo de Costa Brava (Klifa Marbordo) en Hispanio. Inf.: luis_serrano@mixmail.com

Kiel kutime, en nia sidejo vi trovos pliajn informojn pri la ĉi-supraj eventoj kaj, eventuale, eĉ kunvojaĝantoj.



H.E.F.

DEĴORADO ĈE LA HEF-Oficejo.

Sabate, de 11,00 ĝis 13,00, deĵoras Miguel, estrarano pri HEJS.

FORPASIS DU VETERANAJ AMIKOJ.

Kiel kelkaj el vi bedaŭrinde jam scias, oni informis ke dum tiu-ĉi monato forpasis du agemaj kaj karaj veteranaj samideanoj: Giordano Moya kaj Vicente Hernández Llusera.
http://eo.wikipedia.org/wiki/Giordano_Moya
http://eo.wikipedia.org/wiki/Vicente_Hernández_Llusera
Ili pace ripozu, kaj restu en nia memoro.


(Toño del Barrio. 27/02/2009)

Nova aŭtomata tradukilo lernas Esperanton.

Administrantoj de la traduk-programaro "Apertium" komencis evoluigi version por aŭtomata tradukado el la angla al Esperanto. La teknologio estis origine evoluigita de la Universitato de Alakanto, en Hispanio, por aŭtomata tradukado inter proksimaj lingvoj, kiel la hispana kaj la kataluna. Kataluna Esperanto-Asocio kaj Héctor Alós i Font antaŭ unu jaro kunlaboris en la projekto, kaj al la programo estis aldonitaj versioj por traduko el la hispana kaj el la kataluna al Esperanto. Nun la dana esperantisto kaj programisto Jacob Nordfalk kunlaboras kun la teamo por aldoni tradukon el la angla al Esperanto. Libera Folio petis ilin klarigi, pri kio temas kaj por kio utilas la projekto.
Legu la tutan artikolon ĉe: http://www.liberafolio.org

(Miguel Gutiérrez Adúriz. 09/03/2009)

La 68a **Hispana Kongreso de Esperanto** okazos en Malago, de la 2a ĝis 5a julio, 2009 (de ĵaŭdo ĝis dimanĉo).
Ĝis nun aliĝis 55 homoj (07/05/2009).



Afiŝo de la 68-a hispana kongreso.

TRA LA MONDO ...

EŬROPA PARLAMENTO.

Eŭropa Parlamentanino, Ljudmila Novak, prezentis en Komitato por Kulturo sub la signo: PE 416.668v01-00 kadre de debato pri la raporto/opinio pri multlingveco de Vasco Graca Moura tri proponojn pri ŝanĝoj de artikolo 4:
Propono pri ŝanĝo:....4b. (nova) proponas, ke konservante kaj uzante vivajn lingvojn, estimante lingvan diversecon kaj stimulante lernad on de diversaj lingvoj, oni pristudu la eblon kaj utilon de enkonduko de komuna artefarita lingvo en EU, ekzemple Esperanto. Nur ĝi povus faciligi interkompreniĝon en Eŭropo kaj kun loĝantoj de aliaj kontinentoj, ĉar ĝi estas simpla por lernado kaj uzo.
Propono de ŝanĝo:
4.c. (nova) konstatas, ke la enkonduko de e ŭro kiel komuna eŭropa monunuo, ege faciligis komercadon inter la ŝtatoj kaj helpis al ekonomia kresko kaj pli granda stabileco en EU. Similajn efektojn povus havi anka ŭ enkonduko de komuna komuniklingvo, kiu ja neniel forigus aŭ limigus uzon de naciaj kaj aliaj vivaj lingvoj uzataj en EU.

("Nia Voĉo". Organo de Madrida E-Liceo. Marto 2009).

LIBROSERVO DE UEA VENDIS POR 125.125 EŬROJ.

Kun 349 ekzempleroj, la gvidilo "Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA", lanĉita en la 93-a UK, estis la plej furora titolo de la Libroservo de UEA en 2008. Ĝi ne estis aĉetebla dum kvin jaroj, kio akumulis tian bezonon, ke en kvin monatoj ĝi saltis al la pinto de la tutjara statistiko. Post ses jaroj sur la unua loko, "Vojaĝo en Esperanto-lando" de Boris Kolker (229) estis la tria; la duan lokon okupis la adresaro de Pasporta Servo (284). Furoris ankaŭ la artikolaro de Ulrich Lins pri la historio de UEA, "Utila Estas Aliĝo" (214), aperinta en la antaŭlasta tago de la UK.

Ses pliaj libroj atingis pli ol 100-ekzempleran kvanton: la ekzercilo "Poŝamiko" de B. Allée kaj K. Kováts (186), "Gerda malaperis!" de Claude Piron (181), la gvidilo pri la kvartalo de la CO "Tuj apude" de Humphrey Tonkin (170), la enkonduka libreto "La Komuna Eŭropa Referenckadro" (145), la elementa lernolibro "Saluton!" de A. Childs-Mee (107) kaj "Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj" de R. Bolt (106).

La vendoj sumiĝis je 125.125 EUR (122.420 en 2007). Estis venditaj 13.707 ekzempleroj de 2.554 malsmaj libroj kaj diskoj, ne enkalkulante insignojn, glumarkojn k.s. Entute 662 klientoj aĉetis poŝte aŭ surloke en la CO almenaŭ unufoje dum la jaro, sed tiu nombro ne inkluzivas la klientojn de la kongresa libroservo dum la 93-a UK.

Pli detalaj informoj pri la vendoj en 2008 aperas en la marta numero de la revuo "Esperanto".

(Osmo Buller. Ĝenerala Direktoro de UEA. Gazetara komuniko n-ro. 317. 11/03/2009)

EŬROPAJ BALOTOJ 2009.

La germana sekcio de Eŭropo - Demokratio - Esperanto (EDE) kolektis 4.000 subskribojn por partopreni en la Eŭropaj Balotoj 2009!

Jam pli ol du semajnojn antaŭ la limdato 31-a de marto la germana sekcio de "Eŭropo - Demokratio - Esperanto" sukcesis venki la ĉefan obstaklon por partopreni en la Eŭropaj Balotoj 2009: Ĝi kolektis 4.000 subtenajn subskribojn, ĉiuj kun la necesa konfirmo de la respektiva urba administrejo pri tio, ke la subskribinto havas voĉdonrajton en Germanio. Ĉar multegaj formularoj ankoraŭ kuŝas ĉe kolektintoj aŭ ĉe urbaj administrejoj, la suma nombro de subskribintoj estas certe jam multe pli alta.

Plej verŝajne (se la balotestro ne trovos erarojn ĉe iuj formalaĵoj) EDE-Germanio do sukcesos partopreni en la balotoj. Tio signifas, ke 62 milionoj da germanoj povos voĉdoni por EDE la 7-an de junio; la nomo "Eŭropo - Demokratio - Esperanto" troviĝos sur ĉiu balotilo. Ĉar nur ĉ. 40 % de la rajtigitoj efektive iros al la balotoj, EDE-Germanio bezonos ĉ. 1,2 milionojn da voĉoj por superi la 5 %-an limon por ekhavi deputitojn en la parlamento. Dum tiu ŝanco eble ne aspektos alta, alia limo - la 0,5 %-a limo por ricevi altegan financan subtenon de la germana ŝtato - povus esti venkebla, se oni konsideras la entuziasmon, kun kiu germanaj esperantistoj kolektis la subskribojn, kaj la ofte surprize pozitivan sintenon de neesperantistoj pri EDE.

La partopreno en la balotoj certigos al EDE grandan eĥon en amaskomunikiloj kaj la eblecon senpage elsendi varban filmeton en la germana televido. Ankaŭ en Francio la partopreno en la balotoj plej verŝajne sukcesos.

Intertempe EDE-Germanio jam povas komenci prepari sian elektokampanjon. Ĝia ĉefa slogano estas: "EDE - damit Europa sich versteht" - "EDE - por ke Eŭropo kompreniĝu".

Ulrich Matthias (ulrich.matthias heliko t-online.de)

(Miguel Gutiérrez Adúriz. 15/03/2009)

La freneza veto de Triballat.

Olivier Clanchin, prezidanto de firmao-grupo Triballat, volas igi Esperanton lingvo de la komerco. Li nuntempe eksperimentas la projekton kun siaj teamoj.

Ni ĝin jam anoncis (februara numero de "Le Journal des Entreprises"), Olivier Clanchin preparas operacion aparte originalan kaj iel premieran. La estro de la grupo Triballat, en la urbo Noyal-sur-Vilaine, akiris komence de la nuna jaro malgrandan italan entreprenon. Famkonatas pri ĉiuj eksterlandaj aĉetoj: la plej malfacila parto estas "agordi la violonojn" (kio, en la franca, signifas: harmonie kunlaborigi la homojn) inter ambaŭ malsamkulturaj organizoj. Kaj ĉar la angla ne estas tiom evidenta por la francoj kaj la italoj, Olivier Clanchin lanĉas frenezan defion, ke iuj el liaj dungitoj povos komuniki kun la itala teamo en... Esperanto ! Verŝajne, jen premiero en Francio.

La bretona industriestro asociiĝis kun Daniel Jouan (komunikisto en urbo Rennes), Jean-Marc Léveque (la respondeculo pri daŭrigopovo ĉe Triballat) kaj Philippe Bérizzi (estro de la tradukagentejo Lingua Force en Rennes) por krei la asocion "Entreprise Esperanto". Kio estas la principo? Temas pri starigi profesian trejnigon per fulminstruo al la bretonaj kaj italaj teamoj, por ke ili lernu la universalan "profesiecan" lingvon, precizigas Philippe Berizzi, homo kiu lernas Esperanton de dudek jaroj.

Pli facila kaj malpli multekosta ol la angla "La trejnado okazos dum dufoje kvin tagoj kun tri francoj kaj tri italoj. La celo estas ke ili kapablu paroli, sin prezenti, organizi rendevuojn, kaj sekve labori kune." - Tiujn fulmkursojn, kiuj devus komenci ĉimonate, kreis Philippe Bérizzi mem. "Mi jam testis ĝin kun individuoj, kaj tio ne malbone funkcias". Por Triballat kaj ties nova filio Integralimenti, okazos sesio en Francio kaj alia en Italio. Je kiu buĝeto? Po 200 eŭroj tage por ĉiu lernanto.

Per tiu eksperimento, promociantoj de la projekto celas demonstri ke eblas, danke al Esperanto, starigi ene de kompanioj internaciajn teamojn kapablaj kune komuniki alimaniere ol en la angla. Ĉar laŭ iu esploro "Esperanton oni lernas dekfoje pli rapide ol la anglan, indikas la estro de LinguaForce.

Konkrete, tio do signifas malpli altajn trejnkostojn." Rezultojn de la eksperimento, oni vidos en la venontaj monatoj.

Artikolo kaj teksto en www.linguaforce.com/presse Journal des entreprises - Ille et Vilaine - marto 2009 (esperantigo de la artikolo). inf: Philippe Bérizzi

(Miguel Gutiérrez Adúriz. 22/03/2009)

MEMBROSTATISTIKO DE UEA EN 2008: PERDOJ KAJ KRESKOJ.

En 2008 UEA registris la plej malgrandan nombron de individuaj membroj (IM) post la Dua Mondmilito: 5702, t.e. je 11 malpli ol la antaŭa malrekodo el 2002 kaj je 309 malpli ol en 2007. Kiel atendite, la plej granda falo okazis en Japanio, kiu pro la Jokohama UK estis la plej granda lando laŭ la nombro de IM en 2007, entute 856, sed en 2008 ĝi falis al 402. La perdo en Japanio estis do 454. Ĉar la tuta perdo estis 309, la cetera mondo kompensis do unu trionon de perdo en Japanio. Francio rekonkeris la unuan lokon kun 583 IM (+35); la dua estis Germanio kun 534 IM (+20). Unu el kvin IM de UEA (19,5%) estis en tiuj du landoj.

Aliaj landoj kun multe da IM estis Brazilo (337; -7), Usono (314; -16), Nederlando (254; +5), Rusio (209; +58), Italio (208; +4), Belgio (159, +9), Svedio (154; -10), Britio (153; +4), Hispanio (147; +4), Finnlando (136; -20), Ĉinio (127; -14), Pollando (120; +20), Hungario (113; +13), Danio (97; +6), Svislando (85; +4), Ĉeĥio (82; +6), Vjetnamio (78; -5) kaj Kanado (75; +2).

La tuta membraro de UEA tamen kreskis per 706, ĉar la aligitaj membroj (AM) plimultiĝis el 11477 al 12492, dank' al Hungario, kiu en 2007 pagis por 100 AM sed en 2008 por 1348. (AM estas tiuj anoj de la landaj asocioj, kiuj ne estas IM de UEA.). Hungario liveris sume 1461 membrojn (IM + AM) kaj estis la lando kun plej multe da UEA-anoj. Aliaj landoj kun multe da AM estis Ĉinio (1051; +/-0), Germanio (832; +69), Italio (777; +40), Japanio (677; -314), Francio (553; +221), Pollando (500; +/-0), Belgio (480; -33) kaj Usono |(341; -44).

Pozitiva estis la kresko de Societo Zamenhof al 166 anoj (+39). Revuo "Esperanto" havis 3860 pagitajn abonojn (-157) kaj "Kontakto" 845 (+100).

(Osmo Buller. Ĝenerala Direktoro de UEA. Gazetara komuniko n-ro. 318. 22/03/2009)

E-ŜTATO EN LA 60-aj JAROJ.

Mi ĵus trovis kun surprizo ke kreiĝis esperanto-ŝtato, multe pli frue ol la ridinda civito. En la jaro 1968 floris la "Respubliko de la Insulo de la Rozoj" sur mara platformo. La oficiala lingvo estis Esperanto, kompreneble!
(http://es.wikipedia.org/wiki/Isla_de_las_Rosas).
Oni "skuis" la aferon en meneame.net: (http://meneame.net/story/republica-isla-rosas-rara-historia-plataforma-estado-medio).

Do, ĉiuj klopodoj krei esperanto-ŝtaton aspektas same komikaj kaj ridindaj. Ni notu...

(M. Pancorbo (Madrido). 23/03/2009)

NOVA KORESPONDA SERVO (KUN FOTOJ!).

Ekfunkciis nova internacia esperantista koresponda servo kun la nomo "Koresponda Servo Universala, KSU". La Servon iniciatis Viktor Kudrjavcev, redaktoro de la revuo "Komencanto".

La servo facilas por uzo kaj preskaŭ ĉiuj korespondanoncoj kunhavas fotojn! Adreso de la servo: http://esperanto-plus.ru/koresponda-servo/

Krom plumamikaj "Koresponda Servo Universala" akceptas ankaŭ alispecajn anoncojn kaj informojn!

(Germain PIRLOT. 10/04/2009)

Kantistino de la 54a Eŭrovida Kanzonkonkurso en Esperanto.

La oficiala retejo de la franca kantistino Patricia Kaas enhavas 39 tradukojn de la kanzono kiu reprezentos Francujon en la 54a Eŭrovida Kanzonkonkurso en Moskvo la 16an de majo 2009. Esperanto estas unu el la malmultaj lingvoj kun kompleta teksto. http://www.patriciakaas.net/eurovision2009/ (alklaku LES PAROLES)"

La 54a Eŭrovida Kanzonkonkurso okazos en Moskvo la 12an (unua duonfinalo), 14an (dua duonfinalo) kaj 16an (finalo) de majo 2009 kun la partopreno de 42 landoj. Francujo, kiel unu el la kvar plej gravaj monkontribuantoj de la Eŭropa Raditelevida Unio, rajtas partopreni rekte en la finalo la 16an de majo. La produktteamo de Patricia Kaas, la fama kantistino kiu reprezentos Francujon kun la kanzono "Et s'il fallait le faire" ("Kaj se endus fari tion") decidis, ke ties teksto ne nur estos tradukita en la anglan sed en kiel eble plej multajn lingvojn de la 41 aliaj partoprenontaj landoj. Plej miriga (kaj salutinda) estas la elekto de Esperanto kiel lingvo en kiun la teksto ankaŭ estas tradukita, kvankam ĝi estas oficiala lingvo de neniu lando : iom post iom, la bildo de nia lingvo ŝanĝiĝas en la ĝenerala publiko...

(Darío Rodríguez. 01/05/2009)

Akademio de Esperanto. Listo de Rekomendataj Landnomoj

En 1989 la Akademio de Esperanto publikigis dokumenton kun la nomo Listo de Normaj Landnomoj (Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 9). Tiu ĉi Listo de Rekomendataj Landnomoj estas ĝisdatigita kaj reviziita versio de tiu dokumento. Tiu ĉi nova versio anstataŭas la malnovan.

Same kiel la malnova versio, tiu ĉi listo ne estas deviga. Ĝi estas rekomendo. Sed ĝi enhavas kelkajn nomojn kun landaj aŭ popolaj radikoj oficialaj aŭ eĉ Fundamentaj. Pri tiuj nomoj oni atentu speciale.

Tiu ĉi Listo de Rekomendataj Landnomoj estis aprobita de la Akademio en Marto 2009. Vidu la Oficialajn Informojn Numero 11 - 2009 04 15. La dokumento en formato pdf estas trovebla ĉe:
http://www.akademio-de-esperanto.org/decidoj/landnomoj/listo_de_rekomendataj_landnomoj/Oficialaj_Informoj_de_AdE_-_numero_12_2009_-_Listo_de_Rekomendataj_Landnomoj.pdf

(Miguel Gutiérrez Adúriz. 05/05/2009)